

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la svisa kurtunda radiostacio. Anstataŭ profesoro Charles Ecabert, kiu bedaŭrinde estas grave malsana, vi aŭdas Claude Gacond, kiu prelegas pri la problemoj de la instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj.

Antaŭ du semajnoj mi rakontis al vi, ke la delegitara kongreso de Internacia Federacio de Instruistaroj Asocioj decidis enketi pri la rezultoj de la instruado de esperanto en la unuagradaj lernejoj. Mi poste montris al vi, ke por solvi la lingvo-kaoson ne nur esperanto estas proponata. Ĝis hodiaŭ la profesoroj pri lingvo-instruado proponis la devigan instruadon de nacia lingvo en ĉiuj lernejoj de la mondo. Antaŭ ĉio ili pensis tiam al la instruado de la angla. Post ekzameno de tiu propono ni vidis, ke la klasikemuloj reagis proponante la latinan por malebligi la tujan solviĝon de la problemoj, ĉar ili timas, ke ĝeneraligita instruado de nacia lingvo mortigu la klasikan humanismon.

Hodiaŭ ni parolos pri alia solvo proponita de franca movado. Multaj francaj intelektuloj timas, ke la angla lingvo anstataŭu iom post iom la francan en la lernejoj kiel fremda lingvo. Por defendi la instruadon de la franca kiel fremda lingvo ili trovis en 1951 novan formulon kaj fondis asocion, kiu nomiĝas *Monde bilingue* (en esperanto : Dulingva Mondo).

La programo de tiu movado estas tre simpla. Pro tio ĝi renkontis grandan sukceson dum la unuaj jaroj, tio ĉefe en Francio. Ni povas ĝin resumi jene :

Ĉiuj angloparolantoj lernu la francan ekde la unuagrada instruado kaj ĉiuj francparolantoj lernu la anglan ekde la unuagrada instruado. En la aliaj lingvoregionoj la gelernantoj elektu libere inter ambaŭ lingvoj. En la gimnazioj ili se eble lernu ambaŭ lingvojn. Tiel oni povus sin komprenigi ĉie, se ne de ĉiuj.

La fakta situacio, la supereco de la angla kaj de la franca, transformiĝus tiel en juran situacion. Samtempe la potenco de ambaŭ lingvoj plifortiĝus.

Dum kelkaj jaroj tiu angla-franca dulingvismo havis multajn apogantojn, ĉefe en Francio. Ŝajnas hodiaŭ, ke por multaj estis metodo por kontraŭstari la esperanto-peticion al Unesko. La propagando ĉiam pli kaj pli akriĝis ĝis 1954. Sed post la adopto de la ĉefaj paragrafoj de la esperanto-peticio fare de Unesko en Montevideo la dulingva propagando tre rapide silentiĝis. Povas esti, ke por multaj intelektuloj tiu dulingvismo estis nura slogano kontraŭ nia lingvo.

Sed inter la proponintoj de tiu dulingvismo estis sinceraj personoj, kiuj faris interesan laboron. Kaj tiuj sinceruloj ĉefe okupiĝis pri ĝemeliĝo de urboj en la celo komprenigi al la urbanoj la neceson organizi nian mondon. La ĝemeliĝo de urboj permesas interŝanĝi spertojn. Rilate la edukadon la ĝemeliĝo kuraĝigas la instruadon de fremda lingvo kaj eĉ interŝanĝon de la plej kapablaj gelernantoj.

La oficiala organo de la movado Dulingva Mondo estas *Cités unies* (en esperanto : Unuiĝintaj Urboj). La teorio montriĝis ne tre taŭga, sed la praktiko de la ĝemeliĝo de komunumoj bone sukcesis. Tiu movado do respondis al bezono. Povas esti, ke ĝi kondukos al speco de mondialismo.

Koncerne la lingvo-instruadon tiu asocio faris kelkajn interesajn eksperimentojn. En kelkaj lernejoj oni provis tre fruan instruadon de la angla aŭ de la franca lingvo, kiel fremda lingvo. Oni sisteme eksperimentis en aliaj lernejoj plej diversajn instrumentojn. Bedaŭrinde oni ne ĉiam science studis ĉiujn rezultojn. Sed tiuj eksperimentoj venas tamen klarigi multajn pedagogiajn demandojn.

Koncerne la instruadon de fremda lingvo al tre junaj gelernantoj (infanoj 6-jaraj ĝis 9-jaraj) oni konstatis plian fojon iujn danĝerojn evitendajn. Dum la plej inteligentaj gelernantoj profitas pri tiu instruado, la mezkapablaj kaj malpli bonaj gelernantoj malprofitas pri ĝi. Jen la

klarigoj. Infano, kiu havas grandan memorkapablon sukcese lernas fremdajn vortojn apud tiuj de la lerneja lingvo (tiu lerneja lingvo ne ĉiam estas la patrino). Sed infanoj, kiuj pene kapablas asimili la vortojn de sia lingvo (kaj tio estas la granda plimulto de la gelernantoj) ribelas kontraŭ la instruado de fremda lingvo.

Per cifera ekzemplo ni povas klarigi la aferon tiel : Ni diru, ke por mezkapabla infano tiu vortkvanto estas 100. Se en la lerneja kaj hejma vivo tiu infano devas lerni dum tiu periodo 80 vortojn, li kapablos ilin enmemorigi. Sed se la vortoj lernendaj superas la kvoton 100, la enmemorigado ne plu bone funkcias. Okazos vortmiksaĵo. Infano, kiu ekzemple devus lerni 120 vortojn dum tiu periodo, miksus la 20 troajn vortojn kun la 100 vortoj, kiujn li estus estinta kapabla lerni. Rezulto : li nur memoros kelkajn 80 vortojn kaj miksos 40 vortojn. Post kelkaj semajnoj la rezulto fariĝas vera katastrofo. Kaj la infano, kiu sen tio estus eble bona lernanto, reagos kontraŭ la instruado. Li aŭ simple korpe malsaniĝos, aŭ mense malsaniĝos, kaj tio estas pli grava. Li ekzemple ekbalbutos, aŭ ribelos kontraŭ ĉio, kio estas lerneja, aŭ kaptos astmon, aŭ fariĝos batalema kontraŭ siaj kamaradoj, ktp...

Per testoj oni povas elekti la infanojn, kiuj havas grandan memorkapablon. Al ili oni povas instrui ekde tre frua aĝo duan lingvon. Ĝis la 10-a jaro oni evitos tro skribi tiun duan lingvon, ĉar la ortografiaj refleksoj de la unua lingvo povus esti perturbataj.

Se en klaso troviĝas infanoj kapablaj lerni fremdan lingvon kaj infanoj, kiuj tion ne kapablas, oni povas formi du grupojn. Dum la plej kapablaj lernas fremdan lingvon, la alia ripetas sian propran lingvon.

Kiam oni volas instrui fremdan lingvon al tre junaj infanoj, oni devas doni ĉiutage mallongajn lecionojn. Oni devas multe paroli kaj ludi. Oni devas instrui frazojn, antaŭ ol instrui vortojn. Oni devas eviti klarigi gramatikajn regulojn. Per la marioneta teatro oni atingas eksterordinarajn rezultojn.

Ni estu dankemaj al la dulingvistoj pro iliaj ĝemeliĝoj de urboj kaj pedagogiaj eksperimentoj.

Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Parolis Claude Gacond pri la problemoj de la instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj.

-oOo-